


<p><b>Diritti linguistici, apprendimento delle lingue ed educazione per tutti.</b>          Simposio della conferenza internazionale dell'ilei          27 luglio 2006</p>	<p><b>Lingvaj rajtoj, lingvolernado kaj edukado por ĉiuj.</b>          Simpozio de internacia Ilei-konferenco          La 27an de julio 2006</p>	<p><b>39<sup>a</sup> CONFERENZA DELL' ILEI</b>          PARMA 2006.07.25-29</p>  <p><b>DIRITTI LINGUISTICI, STUDIO DELLE LINGUE E EDUCAZIONE PER TUTTI</b></p>
--	--	---

**Prof. Humphrey Tonkin**  
**University of Hartford, USA**  
[tonkin@hartford.edu](mailto:tonkin@hartford.edu)

### **Fremdlingva studado en Usono: demandoj kaj problemoj**

Fakuloj pri lingva politiko tre bone konas la kontraŭajn impulsojn, kiuj jen puŝas komunumojn al insistado pri la uzo de la propra lingvo kun siaj alilingvaj najbaroj kaj jen al akomodigo kun la najbaroj per la uzo de la lingvoj de tiuj najbaroj. Tiel, en la kunteksto de la Eŭropa Unio aŭ Unuiĝintaj Nacioj, la franca registaro insistas pri la prerogativoj ligitaj al la statuso de la franca lingvo kaj, ĉie kie tio eblas, utiligas ĝin kiel diplomatan **lingua franca** (aŭ interlingvon) kiam ĝi engaĝiĝas kun parolantoj de aliaj lingvoj; sed francaj diplomatoj akomodas sin al certaj parolantoj de la angla por intertrakti kun la koncernaj kolegoj. En lastaj jaroj, en la kazo de Francio, ni rimarkis malfortigon de la franca insistado pri ekskluziva uzo de la franca en diversaj lingvaj terenoj. Tial, francaj partoprenantoj en internaciaj fakaj konferencoj pli kaj pli ofte elektas prezenti siajn referaĵojn en la angla; referaĵoj verkita en la angla estas alte taksataj en la mezurado de produktivo de francaj sciencistoj, kaj la lernado de la angla fariĝas ĝenerale pli disvastigita en Francio ol antaŭe.

Dum ni povus argumenti, ke tiu procedo de angligo estas neevitebla, ĝia relativa rapideco rezultas el kompromiso: francparolantoj pli kaj pli ofte decidas sekvi la vojon de akomodigo prefere al la vojo de diferencigo, rekonante sian falantan povon regi la lingvoelekton sur difinita lingva tereno, kaj ankaŭ rekonante, ke ilia lingvo estas ĉiam malpli komprenata de alilandanoj kaj sekve la substanco de ilia (franclingva) mesaĝo estas ĉiam malpli transdonata al la aŭskultantoj. Fronte al elekto inter marĝeniĝo de ilia mesaĝo aŭ marĝeniĝo de ilia lingvo, ili elektas marĝenigi la lingvon. Rezulte, la procedo de transiro al la angla plirapidiĝas kaj la franca perdas sian terenon, ĉiam pli subite.

Ni povus aserti, ke tiu ĉi lernolibra kazo de lingvoŝoviĝo estas esence neegala batalo inter du lingvoj. La malegaleco fontas parte el la konduto de nedenaskaj parolantoj de la franca kaj la angla, kiuj, fronte al elekto, ĉiam pli ofte elektas investi je la lernado de la angla ol de la franca. La du lingvoj, tradicie rekonataj kiel la ĉefaj interlingvoj de la internacia intertrakto (almenaŭ en okcidento), jam de pli ol cent jaroj ŝovadis siajn relativajn poziciojn dum la ekonomia potenco de Usono eklipsis tiun de Francio kaj dum ekonomia aktivado fariĝis pli kaj pli internacia. Tiel la angla starigis sin kiel la ĉefan lingvon de internacia komunikado kaj la franca rapide ŝoviĝas el ĝenerala internacia cirkulado por fariĝi la nacia lingvo de tamen ekonomie potenca internacia rolanto kun iom fragila francparolanta reto, kiu inkluzivas franclingvan Kanadon, la tielnomatan franclingvan Afrikon, kaj diversajn aliajn fokusopunktojn de franca influo.

Ĉe la alia flanko de la kompromiso estas la parolantoj de la angla. Ili apartenas al diversaj kategorioj. Ĉe la kerno troviĝas la denaskaj parolantoj. Ĉirkaŭ ili grupiĝas konsiderinde pli granda nombro de alte kompetentaj nedenaskaj parolantoj, iuj kiuj loĝas en mondopartoj politike forte influataj de Britio aŭ Usono (anglalingva Afriko, Hindio, Israelo, Filipinoj), iuj kiel membroj de internacia elito, kiu enhavas parolantojn de ĉiuj mondopartoj, kiuj uzas la anglan regule kiel unu lingvon en sia repertuaro de lingvoj kaj kiuj eble iam studis aŭ loĝis en Usono aŭ alia anglalingva lando. Tiu granda grupo de nedenaskaj parolantoj, nun pli multnombraj ol la denaskaj parolantoj, antaŭvideble havos kreskantan influon je la lingva evoluo de la angla.

Ĉirkaŭ tiu dua grupo troviĝas tria malpli klare difinita grupo – individuoj, kiuj uzas la anglan en relative limigita kunteksto, aŭ kiuj estas ne-elitaj membroj de komunumoj kie Esperanto estas uzata iagrade kiel interlingvo (Hindio, ekzemple). Fine, kaj preter tiu tria grupo, estas tiuj, kiuj lernas la anglan, parte en neformalaj kondiĉoj, sed ĉefe en lernejoj tra la tuta mondo. La solaj landoj en la mondo kie la angla ne estas signifa ero en la lernejoj instruprogramoj estas la anglalingvaj landoj (kvankam oni povus parentezi, ke enmigrado en tiujn landojn produktas aron da gejunuloj, kies anglalingvaj bezonoj devas esti traktataj pere de la eduka sistemo). Neanglalingvaj landoj estas devigataj al peza investo je anglalingva lernado por entute resti en konkurenco, kaj tio metas signifan ŝarĝon sur la lernejoj en tiuj landoj – kaj finance kaj en la lerneja tago. Temas pri tempo kaj mono, kiujn registaroj ofte malfacile trovas ĉar ekonomiaj kondiĉoj jam malavantaĝas ilin kompare kun la eduka investo de Britio aŭ Usono. La lernadon de la angla lingvo rapidigas lavango de anglalingvaj kulturaj produktaĵoj – filmoj, televidaj programoj, videoludoj, muziko, libroj – kiuj haveblas tra la mondo en la ĉiam pli malfermaj merkatoj, kaj pere de la vastiĝanta Interreto. La ekzisto de tiuj kulturaj produktoj kreas fortan stimulon mastri la anglan, kio faciligas la taskon de lingvoinstruistoj kaj plifortigas la antaŭvideblajn rezultojn de ilia laboro.

Sub tiaj cirkonstancoj, apenaŭ ekzistas motivo akiri aliajn lingvojn ĉe la meza denaska parolanto de la angla ordinare aktiva en internaciaj aferoj. Efektive, en situacio kie parolantoj de aliaj lingvoj akomodigis al utiligo de la angla en internaciaj interagoj, se establitaj parolantoj de la angla uzas aliajn lingvojn, ili nur malrapidigas la baldaŭan dominadon de la angla. Philippe Van Parijs priskribis la procedon per kiu oni elektas unusolan interlingvon por komunikado en ŝajne multlingva medio: se la grupo deziras enpreni ĉiun (la **deziro inkluzivi** estas la ŝlosila elemento), ili elektas la solvon “maksimanan” – ili akomodas sin al tiu, kiu havas la **minimuman** lingvan repertuaron por **maksimumigi** la komunikadon. Se kvar homoj parolas la francan kaj havas ioman scion de la angla, kaj unu parolas la anglan sed ne havas konstatablan kapablon pri la franca, la angla fariĝas la

interlingvo. Kompreneble, se la parolanto de la angla havas nenion por proponi al la dialogo kaj se la francparolantoj regas la interagadon, la deziro inkluzivi eventuale reduktiĝos kaj la aliaj grupanoj refalos en la francan.

En la pli vasta tutmonda dialogo de aferoj, parolantoj de la angla havas multon por proponi – grandegan ekonomion, vastan kulturen bazon, signifan politikan pezon, sciencan scion. Ili ankaŭ havas unu grandan mankon – relativan nekapablon paroli aliajn lingvojn. Enketoj pri laborfortoj en Eŭropo regule montras, ke la Unuigita Reĝlando kaj Irlando havas la lingve malplej kapablan laborantaron. Studoj pri lingvolernado en lernejoj montras, ke parolantoj de la angla pasigas malpli da tempo en pli mallongaj periodoj por studi fremdajn lingvojn. Aliloke en Eŭropo, fremdlingva lernado je la meza (sekundara) lerneja nivelo estas preskaŭ universala, kaj je la elementa nivelo ĝi estas vaste praktikata. En naŭdek procentoj de la kazoj la lernata lingvo estas la angla. Kvankam pluraj landoj postulas, ke lernejoj lernu du fremdajn lingvojn (inter ili estas Danlando, Kipro, Germanio, Litovio kaj Pollando), la nombro de lernejoj, kiuj lernas lingvojn aliajn ol la angla, falis en lastaj jaroj.

Kio veras je la elementa kaj meza niveloj same veras je la tria (universitata) nivelo. La angla enpenetris superan edukadon ne nur kiel fremda lingvo sed kiel lingvo de pli vasta komunikado. Parte por konkurenci kun angleparolantaj universitatoj, pli kaj pli eŭropaj universitatoj proponas kursojn instruatajn en la angla – por allogi studentojn el eksterlando (inkluzive aliajn eŭropajn landojn) kaj por pretigi la proprajn studentojn pri tiu lingvo kiu estas rigardata kiel la interlingvo de la sciencoj. Tiu tendenco komenciĝis en la 1980aj jaroj en Nederlando kaj Germanio sed nun vastiĝis al la cetera Eŭropo kaj ankaŭ ekster Eŭropo. Denove temas pri klasika kazo de lingvoŝoviĝo: kreskanta nombro de pritaksaj procedoj por fakoj kaj profesoroj pli alte taksas artikolojn verkitaĵojn en la angla ol en aliaj lingvoj. Multaj cito-indeksoj funkcias per la angla kaj sekve favoras anglalingvajn artikolojn – tiel donante la impreson, ke la angla lingvo dominas sciencan citadon, tute sendepende de tio, ĉu tiel estas. Tiumaniere, enkonstruitaj antaŭjuĝoj rapidigas la angligan procedon.

Subtenantoj de la lernado de fremdaj lingvoj en Usono sekve frontas grandajn obstaklojn al siaj klopodoj antaŭenigi lingvolernadon. Iliaj argumentoj estas divideblaj en kelkajn malsamajn kategoriojn:

**Psikosciencaj argumentoj.** Lerni fremdan lingvon postulas mastradon de komunika kodo alia ol la propra. Tiu ĉi estas valora ekzerco por altigi la pensokapablon, kompreni la arbitran karakteron de signoj, kaj mastri la manipuladojn de sistemoj. Oni povas argumenti, ke tiu procedo prefere komenciĝu frue, en la unuaj elementlernejaj klasoj – kaj ne nepre cele al plena rego de lingvo, sed cele al evoluigo de konsciigo pri la relativeco de lingvoj. Laŭ mia propra sperto, tia emfazo je **diferencoj** inter lingvoj, kaj je lingvoj kiel sistemoj, relative mankas, parte pro la malvasthorizonta pretigo de lingvoinstruistoj. Certe (kaj jen ĝenerala demando), manke de aro de vere kompetentaj lingvoinstruistoj, oni povas malmulton atingi ĉe ĉiu ajn nivelo. Lingvoinstruistoj, se ili estas entute kompetentaj, plejparte kompetentas pri unuopa lingvo aŭ eĉ kelkaj unuopaj lingvoj: ilia edukprogramo dediĉas malmultan atenton al la nocio, ke per akiro de unu fremda lingvo oni povas lerni kapablojn aplikeblajn al la akiro de aliaj lingvoj.

**Kulturaj argumentoj.** Usono estas plejparte lando de migrintoj. Por kompreni ĝian kulturon, oni devas kompreni la iamajn kulturojn de tiuj, kiuj konsistigas Usonon, la ideojn kaj konceptojn, kiuj enfluis la landon el aliaj mondopartoj, la historion de ĝiaj konsistaj popoloj. Krome, Usono estas nur unu nacio inter multaj: Estas grave, eĉ se nur por komparaj celoj, kompreni la originon de aliaj nacioj, la valorojn kiujn ili apogas, kiel ili vivas siajn vivojn, kaj kiel iliaj mondperceptoj kaj prioritatoj malsimilas tiujn de Usono. Oni pli bone komprenas sin mem se oni scias, de kie oni venis. Tiu ĉi nodo de argumentoj estas pleje disvastiĝinta en la dialogo pri subteno de lingvolernado en Usono. Dum la instruado de t.n. heredaj lingvoj (instruado de lingvoj de iamaj enmigrintoj al iliaj posteuloj) eble ricevas ioman apogon eksterlerneje en la minoritataj komunumoj de kie venas iuj studentoj, ĝenerale mankas subtena medio ekster la klasĉambro. La problemon pliakrigas la vaste renkontata supozo, ĝusta aŭ malĝusta, ke en la cetero de la mondo “ĉiu komprenas la anglan lingvon.” Plifortigas tiun konstaton la ĝenerala sento de enmigrintoj kaj aliaj, ke ilia unua prioritato estas lerni la anglan – kies rezulto estas, ke iliaj propraj lingvoj perdas sian favoron aŭ entute malaperas el la familia vivo. Laŭ tiu percepto, fremda lingvo estas eliminenda handikapo, kaj tute ne havaĵo konservinda.

**Praktikaj argumentoj.** Kvankam la angla lingvo estas domina en Usono, multaj minoritataj lingvoj estas parolataj. Ĉiam ekzistas bona ebleco, ke gejunuloj ĝuos avantaĝon en dungigo aŭ alimaniere, se ili akiras unu aŭ kelkajn tiujn lingvojn – precipe la hispanan, sed ankaŭ lingvojn kiel ekzemple la ĉinan aŭ portugalan. La estonteco de Usono parte dependos de ĝia kapablo mastrumi la fenomenon de socia diferenco en ĉiam pli fluida kaj moviĝema popolo. Kaj dum Usono interagas kun siaj najbaroj kaj merkataj partneroj (franclingva Kanado ĉe la nordorienta limo, Meksikio, Eŭropo, Orienta Azio, Brazilo) kono de iliaj lingvoj povus helpi unuopajn usonanojn kaj doni al ili avantaĝojn kiam ili serĉas laboron aŭ klopodas fari sian laboron pli bone. La fokuso de tiuj argumentoj je praktika sperto kondukas senpere al evidenta fakto: plejparte la “fremda” lingvaĵo parolata en Usono estas nenorma. La urba direktoro, aŭ regiona eduka ĉefo, aŭ hospitala funkciulo, kiu studis la kastilian hispanan, certe havos avantaĝon kompare kun tiuj, kiuj ne travivis tiun sperton, sed ne aparte grandan avantaĝon. Lingvoinstruistoj plejparte ne solvis la demandon pri nenorma lingvaĵo kaj ĝia utileco en la klasĉambro aŭ ĝia efiko je pritakso. Lernejoj ne estas tre sukcesaj en instruado de lingvoj por tuja praktika uzo.

**Argumentoj surbaze de naciaj prioritatoj.** En la hodiaŭa integrita mondo, la tutmondiĝo de krimoj kaj perfortoj antaŭeniras paralele kun la pozitivaj aspektoj de tutmondiĝo. Pro nacia sekureco, Usono devas esti bone ekipita por kompreni la lingvojn kaj starpunktojn de amikoj kaj oponentoj. Sen granda rezervo de lingvokapablo, la lando ne pretos por fronti malamikajn aŭ perfortajn agojn en foraj mondopartoj, aŭ bezonon varbi novajn amikojn kaj aliancojn. Tiaj argumentoj el nacia politiko estas aparte efikaj ĉe la subvenciantoj en Vaŝingtono, kiuj, konsciaj pri la bezono de lingva preteco, entuziasmas investi en programoj, kiuj celas atingi ĝin. Siavice, lingvoinstruistoj entuziasmas utiligi argumentojn, kiuj produktos monon. Sekve ili eble donas tro da subteno al la nocio, ke lingvoinstruado en la lernejoj povas signife kontribui al solvo de lingvaj bezonoj en la registaro aŭ la militaj fortoj. Sed la nestabileco de internaciaj aferoj malebligas antaŭdiri kie lingvaj bezonoj estonte aperos. Ene de la pasintaj kelkaj jaroj, la somalia aperis kaj malaperis, la paŝtua kreskis kaj nun falas, la kurda kreskis, la vjetnama falis. Tiam kiam la lernanto finlernas la lingvon, ĝia aktuala jam

forvaporiĝis. Eĉ la grandaj lingvoj trapasas periodojn de alta kaj malalta populareco pro ŝanĝoj en mondaj aferoj. Oni certe povus aserti, ke la araba restos grava tra multaj estontaj jaroj kiel lingvo inda je studo; same pri la ĉina. Sed liveru tiun mesaĝon al fakulo pri la rusa maldungita de la Ŝtata Departamento aŭ la loka universitato.... Ĉi tie, kiel ankaŭ en la unua argumentonodo, la plej bona maniero por kreskigi lingvajn kapablojn estas helpi lingve talentajn homojn evoluigi siajn lingvolernajn kapablojn ĝenerale aŭ en la kunteksto de lingvaj familioj, tiel ke ili plej facile akiru funkcikapablon pri difinita lingvo en minimuma periodo. Apenaŭ necesas mencii, ke Usono devas konkeri siajn dubojn pri dungado de enmigrantoj kun denaska kompetento pri la koncernaj lingvoj.

Evidente, en la kunmeto de eduka programo, tiuj kvar nodoj de argumentoj kondukas en kontraŭaj direktoj. Estas notinde, ke preskaŭ nenij argumentoj indikas al bezono de efektiva **mastrado**, aŭ almenaŭ ke la plej konvinkaj argumentoj rilate al lerneja instruado ne tiel indikas. Nur pri eta minoritato de junuloj, kiuj trapasas usonajn lernejojn, oni povus diri, ke ili **mastris** sian fremdan lingvon aŭ siajn fremdajn lingvojn. Nek la argumentonodoj liveras multan helpon pri la demando, kiujn lingvojn instrui. Se oni konsideras ankaŭ, ke la usona eduka sistemo estas tre malcentrita, kaj multaj lernprogramaj decidoj estas farataj je loka nivelo, lokaj prioritatoj emas domini. Ekzemple, regionoj kun multaj ĉinaj enmigrintoj emas esti tiuj, kies lernejoj proponas la ĉinan – kvankam lernejoj en riĉaj regionoj, kies gepatroj deziras ke la infanoj ĝuu avantaĝon en tutmonda dungigo, ankaŭ eble vidos en la ĉina allogan eblecon, eventuale sen konscii kiel malmultan ĉinlingvan scion gajnos la lernantoj en la dismetita horaro de izolitaj lernsegmentoj, kiu estas tipa en plej multaj lernejoj. Ankaŭ pro la malcentro de la sistemo, infanoj, kiuj translokiĝas de unu regiono de la lando al alia, plej verŝajne malbonŝancos se ili elektis iom malpli ofte instruitan lingvon, kaj tiu misorientiĝo povas fariĝi malavantaĝo eĉ al akiro de la limigita lingvoscio deviga por akcepto en la pli selektaj universitatoj.

Sed la plej granda problemo, kiun subtenantoj de lingvolernado frontas, estas simple la dominado de la angla lingvo sur la monda scenejo. Estas malfacile konvinki gepatrojn, ke fremdlingva scio entute gravas aŭ utilas, aŭ ke en si mem ĝi estas **eduke** utila kapablo.

Feliĉe, dum kreskis la rolo de Usono en la mondo, kreskis ankaŭ la politika konscio de lingvoinstruistoj, kiuj en lastaj jaroj fariĝis konsiderinde pli lertaj pri elformulado de la argumentoj por lerni lingvojn. Ene de kelkaj jaroj, la Amerika Konsilio pri Instruado de Fremdaj Lingvoj (ACTFL), la ĉefa profesia organizaĵo de lingvoinstruistoj, forlasis sian oficejon kaj sian minimuman stabon en ekstera antaŭurbo de Novjorko kaj transformiĝis en bone organizitan kaj politike engaĝitan operacion en Vaŝingtono. La jaro 2005 estis deklarita la Jaro de Lingvoj en Usono, kaj politikistoj kaj grandaj komercistoj grege hastis deklari sian apogon, inter ili ankaŭ Prezidento Bush mem. Oni ja nur imitis similajn klopodojn en Eŭropo, sed eĉ tiu imitado estus nepensebla antaŭ kelkaj jaroj.

Ankoraŭ restas elementoj de la publiko, kiuj restas suspektaj pri fremdlingva scio (oni apenaŭ povas dubi, ke la flueco de John Kerry pri la franca lingvo nenion faris por li en certaj sektoroj dum la prezidenta elekto). Ili eble kaŝas ĉe si neesprimitajn sentojn, ligitajn al la nocio ke nacieco kaj lingvo estas proksime ligitaj, kaj ke flua kapablo pri aliaj lingvoj kompromitas nacian lojalecon. Ili eble ankaŭ kredas, lige kun mia malferma argumento, ke uzo de fremdaj lingvoj reprezentas cedon al la potenco de fremduloj, dum veraj usonanoj devus “alte stari” per parolado de la propra lingvo. Tiaj inhibicioj malhelpis al

lingvoinstruado gajni signifan pozicion en eduka leĝfarado en Vaŝintono: ĝi ne estas inter la bazaj kapabloj en la t.n. Akto “Neniu Infano Postlasita,” kiu bedaŭrinde mistordis lerneajn prioritatojn tra la lando (aŭ fokusis ilin, depende de vidpunkto).

Spite ĉion ĉi, la ĝenerala statistiko pri lingvolernado montras rimarkinde sanan bildon. Laŭ statistiko de ACTFL, je la meza (sekundara) nivelo (inkluzive de la gimnaziaj jaroj, do de la 7-a ĝis la 12-a klasoj), en la jaro 2000 proksimume sep milionoj da lernantoj (33,8% de la tuta lernejanaro) tiumomente studadis fremdajn lingvojn – kontraste al 32,8% en 1994. Je la gimnazia nivelo (la kvar finaj jaroj), la procentaĵo estis 43,8%, kreskinta de 41,9%. Tamen, je la elementa nivelo (infanĝardeno ĝis la 6-a klaso), la procentaĵo falis: de tute etaj 6,4% al eĉ pli etaj 5%. La hispana estis la domina lingvo: 68,8% el ĉiuj fremdlingvaj lernantoj je la sekundara nivelo (7-12) studis la hispanan, kresko de 3,0% de 1994. La franca falis je 1,3% kaj la germana kaj latina registris malgrandajn falojn. Tamen la itala estis enorme kreskinta – je 38%, kvankam sur malgranda nombra bazo.

La enketo de ACTFL pri elementa kaj sekundara edukado estis nekompleta: pro la ekstrema malcentro de la sistemo, estas malfacile kolekti solidajn statistikojn, kaj kompari nombrojn tra la jaroj estas eĉ pli nefidinde, pro ŝanĝiĝantaj kriterioj aŭ kolektometodoj. La statistiko de Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA), kiu kolektas donitaĵojn je la tria, universitata, nivelo, estas konsiderinde pli fidinda ĉar la donitaĵoj estas pli facile kolekteblaj el pli malvasta kaj malpli diversigita bazo. Tie ĉi ni vidas kelkajn kuraĝigajn evoluojn. La sekvaj tabeloj montras gajnojn por preskaŭ ĉiuj lingvoj inter 1998 kaj 2002, inkluzive signifajn gajnojn ĉe la hispana lingvo kaj emfazan kreskon ĉe la itala, kiu survojas al egaleco kun la germana. Kvankam procentaj kreskoj estas malpli signifaj inter la minoraj lingvoj (tiuj, kiuj estas malpli instruataj), la kreskoj ĉe la araba estas notindaj, kiel ankaŭ tiuj ĉe la latina, greka kaj biblia hebrea. Povas esti multaj kialoj de tiuj ŝoviĝoj, sed signifa reviviĝo de lingolernado je la tria eduknivelo ŝajnas okazadi, almenaŭ ĉe kelkaj lingvoj. La statistiko de ACTFL pri la pli fruaj jaroj povus indiki, ke la gajnoj estas tamen esence ciklaj: la nombroj ĉe la elementa kaj malsupera sekundara niveloj montras falojn. Sed tiuj ciferoj estas malfermaj al diversaj interpretoj.

**Table 1a**  
**Fall 1998 and 2002 Foreign Language Enrollments**  
**in United States Institutions of Higher Education**  
**(Languages in Descending Order of 2002 Totals)**

Language	1998	2002	Percentage Change
Spanish	656,590	746,267	13.7
French	199,064	201,979	1.5
German	89,020	91,100	2.3
Italian	49,287	63,899	29.6
American Sign Language	11,420	60,781	432.2
Japanese	43,141	52,238	21.1
Chinese	28,456	34,153	20.0
Latin	26,145	29,841	14.1
Russian	23,791	23,921	0.5
Ancient Greek	16,402	20,376	24.2
Biblical Hebrew	9,099	14,183	55.9
Arabic	5,505	10,584	92.3
Modern Hebrew	6,734	8,619	28.0
Portuguese	6,926	8,385	21.1
Korean	4,479	5,211	16.3
Other languages	17,771	25,716	44.7
Total	1,193,830	1,397,253	17.0

**Table 1b**  
**Fall 1998 and 2002 Foreign Language Enrollments**  
**in United States Institutions of Higher Education**  
**(Languages in Alphabetical Order)**

Language	1998	2002	Percentage Change
American Sign Language	11,420	60,781	432.2
Arabic	5,505	10,584	92.3
Chinese	28,456	34,153	20.0
French	199,064	201,979	1.5
German	89,020	91,100	2.3
Ancient Greek	16,402	20,376	24.2
Biblical Hebrew	9,099	14,183	55.9
Modern Hebrew	6,734	8,619	28.0
Italian	49,287	63,899	29.6
Japanese	43,141	52,238	21.1
Korean	4,479	5,211	16.3
Latin	26,145	29,841	14.1
Portuguese	6,926	8,385	21.1
Russian	23,791	23,921	0.5
Spanish	656,590	746,267	13.7
Other languages	17,771	25,716	44.7
Total	1,193,830	1,397,253	17.0

**Tabelo 1a. Fremdlingvaj aliĝoj en usonaj institucioj de supera edukado en aŭtuno 1998 kaj 2002, ordigitaj laŭ totalaj aliĝoj**


**Tabelo 1b. Fremdlingvaj aliĝoj en usonaj institucioj de supera edukado en aŭtuno 1998 kaj 2002, ordigitaj alfabete laŭ lingvoj**

[Fonto de la statistikaj tabeloj: Elizabeth B. Welles. 2004. Foreign language enrollments in United States institutions of higher education, Fall 2002. **ADFL Bulletin** 35/1-2: 7-26]

Por iom korekti la bildon de lingva diverseco, kiun tiuj ciferoj ŝajnas prezenti, ni ĵetu rigardon al la kresko de hispanlingvaj aliĝoj laŭjare. Ili montras signifan kreskon super ĉiuj aliaj lingvoj, tiel ke hispanlingva instruado nun pligrandas ol instruado de ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj en kombino.

Figure 2

Enrollments in Spanish Compared with Those in All Other Languages, except Latin and Ancient Greek, by Year




Studentoj de la hispana kompare kun tiuj de ĉiuj aliaj lingvoj, escepte latinan kaj antikvan grekan, laŭ jaroj



Se ni rigardas al pli longdaŭraj tendencoj je la supera nivelo, ni vidas daŭran kreskon je absolutaj ciferoj, kvankam se oni prezentus tiun saman statistikon kiel procentaĵojn de ĉiuj studentoj ĉe la supera nivelo en difinita jaro, ili aspektus signife malsamaj. La ciferoj de 1960 reprezentas 16,1% de la tuta studentaro, dum tiuj de 2002 reprezentas nurajn 8,6%. Tamen, malgraŭ tio, ke okazis kresko en la tuta studentaro inter 1998 kaj 2002, tio okazis je pli modesta rapido ol la kresko de aliĝoj al fremdlingvaj kursoj. Kaj 8,6%, la procentaĵo por 2002, estas la plej alta depost la enketo de 1972, do en tridek jaroj.

Kaj kompreneble, neniuj tiuj ciferoj ion ajn diras pri tio, kion la studentoj efektive lernas en la kursoj, kiu en multaj kazoj povus esti tute minimuma; sed, se ĉio alia estas egala, la statistiko estas tamen kuraĝiga.

**Figure 1**  
Foreign Language Enrollments by Year, Excluding Latin and Ancient Greek



### Studentoj de fremdaj lingvoj laŭjare, escepte de la latina kaj antikva greka

Neniu mia konato jam anoncas la malaperon de la Malbela Usonano, kaj la ciferoj en tiu ĉi referaĵo aspektus magraj kompare kun la eŭropaj; tamen ni ne estu tute pretaj rezigni pri la alternativa respondo al la franca dilemo, nome konstruado de aŭtentike multlingva socio tra la mondo, en kiu komunikado trans la lingvoj restas en ekvilibro kun floranta kultivado de lingva diverseco.